

Leĝo pri la historia memoro.

Nova pakto por la forgesado kaj la senpuneco de la frankismo.

La Leĝo-projekto pri la Historia Memoro paktita de la politikaj partioj, kiu nun en oktobro de la 2007a komencas sian finan parlamentan proceduron, rezignas la Veron, la Juston kaj la respekton al al Homaj Rajtoj de la viktimoj de la frankista diktatorado.

CGT manifestas publike sian plej absolutan repuŝon kaj ribelon kontraŭ ĝi kaj ne konsentas pri tio, ke per tiu ĉi leĝo fermiĝas kaj likvidas la ŝuldon, kiun demokracio ankoraŭ havas kun la viktimoj de la frankista reĝimo kaj tiun de tio ĉi kun la Historio.

Tiu ĉi leĝo signifas novan kapitulacion de la demokrataj politikaj fortoj kaj aparte de la socialista registaro, kiuj 30 jaroj kaj du generacioj post la transiro ne kuraĝas fari tion, kion ekde multe petis la Eŭropa Konsilio kaj kio estas normala civitana realo ĉe landoj kiel Ĉilio kaj Argentino: la starigado de iu Komitato pri la Vero, kiu deklaris la radikan nuligon de la frankistaj kortumojn kaj verdiktojn kaj la senpreskriptiĝon de la krimoj kontraŭ la homaj rajtoj faritaj dum tiu tempo, kiel asertas la UNO per diversaj resolucioj. Ĝis kiam oni nuligos entute kaj kun juraj sekvoj la juran punan strukturon de la frankismo, la hispana demokratio estos gardata, kidnapata kaj ligata al tiu kaj la normoj, klopodantaj vuali la kriman realon de la frankista reĝimo, estos nenio plu ol Leĝoj de Fina Punkto.

La Motivado de la Leĝprojekto estas intence plursensa. Tie oni uzas la konceptojn reakordiĝo, konkordo, respekto, pacemo, transiro, konstitucio, retrovado, integriĝemo, kunvivado, adhero, ktp klopodante kaŝi la VERON, klopodante ne nomi la aĵojn per ĝia nomo kaj, sekve, klopodante ne kondamni senpaliative la frankistan reĝimon, la diktatoradon kaj la genocidon suferatajn de pluraj generacioj de homoj, kiuj luktis pro libereco ekde la 1936a. La nunaj generacioj rajtas heredi edukadon kaj instruon bazitan sur la kondamno al la frankista reĝimo pro tio, ke ĝi

kaŭzis la amaron, la suferon, la izoladon, la detruon kaj la fizikan kaj mensan neniigon de pluraj generacioj. La nuna demokratio devas sciigi la junularon pri tio, ke la frankista militista puĉo signifis traŭmatan disrompon de la demokrata sistemo de la 1936a, de la valida politika sistemo, signifis la izoladon de Hispanio, la malkleradon, la socian antaŭeniron sur ĉiuj niveloj, kaj ĉio per la perforto de la plej bazaj homaj rajtoj kaj per krimoj kontraŭ la homaro.

Ĉe la animo de la leĝprojekto oni eltenas la samvaloron de viktimoj kaj ekzekutistoj kaj klopodas egaligi la luktintojn pro la libero kaj la defendintojn de la faŝismo. Videblas klopodo daŭrigi la forgeson, la nesciadon pri la vera historio de la intercivitana milito, la frankismo kaj la diktatorado.

La leĝo ne planas kiel taskon la konstruon de difina kolektiva memoro. Kial? Ĉu tio estus malegaligi viktimojn kaj ekzekutistojn? Se oni ne reakiras la kolektivajn memoron surbazitan sur la vero, la justeco kaj la respekto al la homaj rajtoj, la diktatoro daŭre estos kultata en grandega maŭzoleo kaj la poetoj kaj laboristoj daŭre estos malaperataj en la amas-tombejoj. La normaligo de la publika vivo kaj la fino de la transiro ne okazos ĝis kiam tiu ĉi demokratio rompu kun la frankista reĝimo.

Aliflanke, la leĝo rezignas la reakiron de la kolektiva kaj socia memoro, forgesante, ke la lukto de la hispana popolo pro la libero estis kolektiva projekto. Oni bezonas, ke, krom la rajton al la morala repago kaj la reakiro de la individua kaj familia memoro de la viktimoj de la frankismo (rekupero de la homoj murditaj, enkarcerigitaj, ekzilitaj, torturitaj, malaperitaj, sklavigitaj, elpurigitaj, kondamnitaj...), oni reakiru la sociajn, ekonomiajn, kulturajn, instruajn, organizajn ideojn, kiujn oni defendis el respublikanaj kaj anarkosindikataj konceptadoj, kaj kiuj starigas la kolektivajn kaj socian memoron. Laŭ la CGT nepras, ke ĉe la

instru-centroj oni inkludu kiel studmaterion la konon pri la intercivitana milito, la diktatorado kaj ties genocida subpremado.

Per tiu ĉi leĝo la Administrado tute forlasas la respondecon pri la klarigo de la krimoj kontraŭ la homaro, serĉado de malaperintoj, kaj perfortado de la homaj rajtoj faritaj de la frankismo kaj submetas la viktimojn, por ke individue klopodu la rehabiliton kaj publikan dignigadon antaŭ tiu sama Administrado, plendante por atingi iun Deklaron pri persona repago kaj rekono, kiu je si mem ne estas rekono pri havaĵa respondeco, nek riparo nek mon-kompensoj.

Laŭ la CGT estas neakceptebla, neeltenebla kaj nenegocebla, ke la leĝo ne nuligos la frankistajn verdiktojn. Oni daŭrigas la validigon de la subpremantaj verdiktoj diktitaj de la diktaduro. Ne sufiĉas deklari la karakteron ĝisfunde maljustan de la kondamnoj kaj punoj dum la intercivitana milito, ne sufiĉas eksterleĝigi la tribunalojn, ĵuriojn, punorganojn dum la intercivitana milito kaj ties decidojn, ne sufiĉas deklari eksterleĝaj la frankistajn kondamnojn kaŭze de "form- kaj kerndifektoj", ne sufiĉas rekoni la nunan juran senvalidon de la verdiktoj... Estas absolute necese nuligi klare, frapante, ĉe la artikolaro mem de la leĝo, la frankistajn verdiktojn. La Administrado ne rajtas sin lavi la manojn rilate al la jura validon de tiuj ĉi verdiktoj.

La leĝo nuligas eksplicite iujn frankistajn leĝojn. Kio okazas al tiuj ne nuligitaj? Aliflanke, la ne nuligado implicas la laŭleĝan rekonon de la frankismo. Same la ne nuligado de leĝo signifas ties validon ĝis kiam okazos tiu nuligado. Sekve la revizio de la verdiktoj fariĝas praktike nebla.

La proceduroj kontraŭ Granado kaj Delgado, Joan Peiró, Puig Antich kaj miloj plu daŭros sen iu repago, ili daŭros esti kulpaj laŭ la frankismo kaj ankaŭ laŭ la demokratio.

La leĝo ne aĉetos la silenton de CGT per la plibonigo de iuj monkompensoj, kiujn povas ricevi la viktimoj de la frankismo, monkompensoj foje ridindaj kaj aliffoje malferme diskriminaciaj inter viktimoj antaŭaj

aŭ postaj al la 1968a. Kial tiu ĉi diskriminacioj inter viktimoj?

La Publika Administrado rezignas sian respondecon ĉe la lokalizado de malaperintoj, eltombigo kaj identigado de la viktimoj enterigitaj en amastombejoj. La ŝtato ne nur ne faros tiun taskon, sed ĝi reguligos kaj burokratigos la proceduron, kiun devas plenumi tiuj, kiuj sub persona respondeco deziras fari la taskon.

La Valo de la Falintoj daŭros esti la maŭzoleo de la puĉ- kaj subpremad-gvidantoj, kvankam oni formovos la frankistajn kaj faŝistajn simbolojn aŭ oni ĉesi monkompensi la publikajn aŭ privatajn organizaĵojn, kiuj ne formovos ilin. Oni se starigas la rekonon al la sklava laboro kaj ties repagon antaŭ la sennombraj konstruaĵoj kaj laboroj faritaj.

Oni ne starigas klaran politikon pri rekuperado, rehabilitado kaj aliro al la arĥivoj, oni diras nenion pri la neebleco enskribi mortojn en la civilaj registrejoj aŭ pri la ebleco modifi la kaŭzon de la morto.

Konklude, per tiu ĉi leĝo oni ne riparas la Veron kaj la Juston, oni ne riparas la viktimojn, oni ne ekas la serĉon de malaperintoj, oni ne rekuperas la kolektivan kaj socian memoron, oni ne entreprenas la rekonon de la krimoj kontraŭ la homaro faritaj de la frankismo, oni ne deklaras la kontraŭleĝecon de la frankismo, ne estas definitiva rompo kun la diktatora reĝimo. Tiu ĉi leĝo avalas denove historian memoron skribitan kaj reviziitan de la venkintoj.

CGT ne rezignacias kaj daŭrigos la lukton por la reakiron de la historia memoro de la malvenkintoj. Por tio, ni alvokas ekde nun Socian Mobilizadon de ĉiuj sociaj, sindikataj, politikaj organizaĵoj, kiu estas kontraŭ tiu ĉi leĝo, kiu estas dua memamnestio, kun la pligravigo esti aŭspiciata de sociista partio, kiu permesos definitive firmigi la historian revizion faritan de la venkintoj.

Madrido, oktobro de la 2007a
Sekretariaro pri Trejnado
Komisiono pri Liberecana Memoro